

AVENO #49 - Homaj Rajtoj kaj Respondecoj – 2023

Ghenerala rimarko: pluraj informoj alvenas kun peticio - kompreneble plej multaj el ili ne plu estas aktivaj. Do, bonvolu kontroli la daton, se vi intencas subskribi ian ajn peticion.

Se vi serchas ion chi-sube: kutime mi uzis la literumadon pere de „x aŭ h“: ch, ... sh + u. Ligoj, sed ekde 2023 ĉefe la ĉapelitajn literojn.

Socio de Verduloj Esperantistaj (AVE): www.verduloj.org , novaj artikoloj je la enirpagho, aliaj sub "Dokumentoj"

Homaj Rajtoj (1947): eo.wikipedia.org/wiki/Universala_Deklaracio_de_Homaj_Rajtoj

Lingvaj Rajtoj = Homaj Rajtoj: www.linguistic-rights.org/

Tutmondaj Mondcivitanaĵ Teritorioj: www.recim.org/dem/tcm-list.htm

Rajto de memdetermino: eo.wikipedia.org/wiki/Rajto_de_memdetermino

Homaj Respondecoj (1997):

eo.wikipedia.org/wiki/Universala_Deklaracio_de_Homaj_Respondecoj

la dokumento en la angla, kiu ligas al tradukoj en ch. 40 lingvoj:

www.interactioncouncil.org/publications/universal-declaration-human-responsibilities

Internaciaj Tagoj:

3a de Majo Monda Tago de Gazetara Libereco

26-a de Julio estas la Tago de Mangrovoj & de Esperanto

= = =

1. Was versteht man unter der Nacht der erschossenen Dichter?

In der Nacht vom 29. auf den 30. Oktober 1937 wurden in Minsk, im Keller des [NKWD-Gefängnisses](#) und in der [Pischtschalauski-Burg](#), 132 Menschen erschossen und die Leichen anschließend in [Kurapaty](#) vergraben. Es waren keine einfachen Sowjetbürger, die erschossen wurden, sondern viele bekannte Persönlichkeiten aus Politik, Kultur und Wissenschaft, darunter auch 22 Dichter und Schriftsteller. Eine solch gleichzeitige Massenhinrichtung der belarussischen nationalen Elite hatte es zuvor noch nicht gegeben. Daher erhielt dieses tragische Datum im Großen Terror der 1930er Jahre später die Bezeichnung *Nacht der erschossenen Dichter*.

Jen pli - en la germana:

<https://www.dekoder.org/de/article/nacht-der-erschossenen-dichter-belarus-terror-stalin>

en la rusa - serĉu „1937“ :

<https://www.dekoder.org/ru/poisk>

- - -

2023-07-11 Rusia spionado en nordaj ŝtatoj

Supozeble ili aŭskultas kablojn.

Aliflanke el Skandinavio oni monitoras la rusiajn ŝipojn. Ili trovis ke unu fiŝkaptista ŝipo 130-foje trapasis la kablojn proksime de Spitzbergen, poste la kablo estis damaĝita. Multaj fiŝkaptistaj ŝipoj laboras por la rusia sekreta servo.

Dokumenta filmo aŭdebla eb la franca kaj germana, videbla ĝis 2927-01-11, 54 min.

<https://www.arte.tv/de/videos/115385-001-A/die-spione-unter-uns/>

= =

2023-10-21 **Israelo** same meritas nian helpon, ĉar tiuj miloj da rakedoj de Hamas kaj eĉ pli ilia masakro kaj ostaĝado estas same militkrimo kiel tiu tuta milito de la registaro de Rusio. Israelo proponis la la homoj de Gaza-urbo iri en la sudon; kaj finfine nun komencas alveno de help-materialoj.

En la antaŭ AVENO mi skribis pri la Ĉarto de Hamas de 1988; nun mi eksciis ke en 2017 ili eldonis novan Deklaracion, kiu estas malpli militema, kaj diferencigas inter judaj homoj kaj Israelo - kiu ne havu lokon ĉi tie.

<https://www.nzz.ch/international/die-hamas-mit-revidierter-charta-strategisch-motivierter-vernichtung-light-ld.1289783>

Aliflanke necesas diri ke la registaro de Netanjahu ne respektas la kontraktojn de Oslo kaj Camp David (kontraktoj ek de 1993 ĝis 2000).

https://de.wikipedia.org/wiki/Prinzipienerklaerung_der_Berliner_Vorverhandlungen

En Esperanto vi trovos paĝojn pri ambaŭ eblecoj:

unu ŝtato kun du nacioj: https://eo.wikipedia.org/wiki/Dunacia_solvo

du ŝtatoj: https://eo.wikipedia.org/wiki/Du%Datata_solvo

- - -

2023-10-07 Denove milito en Palesteno & Israelo

Mi ankaŭ ne skribis pri la hodiaŭ okazinta tre forta kaj kruela rakedo-elpafoj de Hamas el Gaza al Israelo, kie jam 200 homoj estis mortigitaj kaj multe pli vunditaj. Hamas ja entute volas neniigi la judan Israelon - laŭ ilia Ĉarto de 1988. Necesas ke Hamas finas la regadon.

Aliflanke necesas menci, ke Israelo - aparte la nuna registaro - subtenas setladon en la tereno kiu apartenus/apartenas al palestenanoj (okcidente de la Jordan rivero), ktp..Tre minacanta miksaĵo.

Kiam mi skribis tion, mi esperis, ke post du tagoj ne plu venos rakedoj el Gaza, kaj finos tiu nuna militado. Sed - tute kontraŭe:

Hamas daŭrigis sendi rakedojn, kaj Israelo bombojn - jam pli pluraj mil mortintoj je ambaŭ flankoj. Granda detruo de konstruaĵoj kaj loĝdomoj en Gaza, kaj komence en Israelo.

- - -

1933 - 1945 Se maljusteco iĝas justeco, tiam kontraŭstaro iĝas devo

Jen dokumento pri la nazi-germania faŝismo, aparte pri la ŝanĝigo de la justico al maljustico.

Finfine en Nurenbergo okazis la persekuto de tiaj „Krimoj kontraŭ homeco“.

Tamen, multaj kunlaborantaj juĝistoj de la „Volksgerichtshof“ sub Freisler, poste ricevis indulgon.

Daŭro 103 minutoj, videbla en la germana kaj franca lingvoj, ĝis 2026-06-20:

<https://www.arte.tv/de/videos/104775-000-A/die-ns-justiz-recht-des-unrechts/>

Komento de AVE/mw:

Mi skribis recenzon pri la libro „La faŝismo“ de Ĵelju Jelev, tie li i.a. montras Georgi Dimitroff kiu dum la procezo pro la bruligo de la „Reichstag“ per klaraj demandoj rilate la

justicosistemo kulpigis Goebbels kaj Goering; pro tio oni finis la transdonon de la paroladoj al la homoj ekster la juĝejo.

- - -

2023-10-17 Pollando - post la elekto - Gratulon -al Zeiloni - aktualaj situacio kaj disputoj
Feliĉe ĉifoje multe pli - 72% - iris voĉdoni. PiS (35,4%) ne plu povas regi sole, kondiĉe ke la alternativa koalicio sukcesas trovi interkonsenton.

La Civitana Koalicio / Koalicja Obywatelska, KO / ricevis 30,7 % , kaj jam antaŭ montriĝis ebla koalicio kun maldekstruloj kaj 3a Vojo.

La Verda Partio, Zieloni, estas parto de ĉi-tiu koalicio, tial ne aperis kiel individua partio.
Małgorzata Tracz, MP, estis je la 2a loko de la listo.

<https://europeangreens.eu/content/poland-shows-power-peoples-vote%C2%A0>

Antaŭ la elekto aperis dokumenta filmo pri diversaj opoziciuloj en Pollando - montras ankaŭ voĉoj de PiS-anoj. PiS regas ek de 10 jaroj. Ĉar tiu ne respektas bazajn liberecojn kaj jur-ŝtatajn regulojn; sed per leĝoj reduktas individuajn rajtojn. Temas pri rifuĝintoj, kiuj estas kvazaŭ senditaj de Belarus. Simile kiel sur la maroj ankaŭ tie estas civitanoj kiuj helpas al la rifuĝintoj finfine atingi sekurecon.

La pozicion de EU prezentas Daniel Freund (MEP de Verduloj/Regionalistoj).

La informoj estas aŭdebla aŭ parte legeblaj en 6 lingvoj (de, en, es, fr, it, pl):

<https://www.arte.tv/de/videos/109845-000-A/polen-an-der-grenze/>

= =

Kongreso de UEA en Italio rezoluciis pri enmigrado

La 1 318 partoprenantoj de la 108a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Torino, Italio, inter

la 29a de julio kaj la 5a de aŭgusto 2023, traktis la temon “Enmigrado – kunfluo de homaj valoroj”. La

partoprenantoj, alvojaĝintaj el 69 diversaj landoj, ne nur diskutis la temon, sed spertis kaj vivis ĝin: ĉar

ĉiuj partoprenantoj parolas la internacian lingvon Esperanto, neniam lingvaj baroj malhelpis

interkomunikadon kaj efektive, konforme al la kongresa temo, la homaj valoroj de ĉiuj ĉeestantoj

kunfluis – en harmonia etoso.

Multaj esperantistoj raportis pri propraj spertoj kiel migrantoj. Ili emfazis, ke la scio de la lingvo

Esperanto ja helpas por ricevi subtenon en la komenco de nova vivo, sed esenca estas la lernado de la

nacia lingvo de la koncerna lando, por povi integriĝi en la socion.

Tio validas por ĉiuj migrantoj – ĉu ili libervole elektis translokiĝi al alia lando aŭ ĉu ili devis fuĝi el sia

hejmlando pro milito, mizero aŭ persekuto.

Sekve, la kongresaj partoprenantoj notis jene:

1. La civila socio en la gastiganta urbo Torino donas modelan ekzemplon por la integriĝo de

migrantoj kaj precipe rifuĝantoj en la socion.

2. Kun zorgo la kongresanoj konstatas, ke la nombro da rifuĝantoj en la mondo

en la pasinta jaro

unufoje superis la ciferon de 100 milionoj. Ni avertas, ke pro la klimatsanĝiĝo pli kaj pli da

homoj estos devigataj forlasi sian hejmon.

3. Ni alvokas ĉiujn ŝtatojn de la mondo ĉesigi la kaŭzojn de malvolonta migrado kaj ni subtenas la

klopodojn de Unuiĝintaj Nacioj kaj de la aliaj superŝtataj organizoj mildigi, se ne solvi la problemojn.

4. Ni apelacias al la ŝtatoj, kien venas rifuĝantoj, akcepti ilin kaj doni al ili ĉiun subtenon por povi

establi memstaran, liberan vivon. Ni estas konvinkitaj ke migrado fine rezultigas pli riĉan

kulturon kaj pli bonstatan socion en tiuj ŝtatoj mem. Ni agnoskas la historian valoron de migrado

– migrado estas bazo por la evoluo de la homaro.

5. Ni apelacias al ĉiuj ŝtatoj garantii al migrantoj povi vivi sen lingva diskriminacio kaj sen ajna alia

diskriminacio, alivorte: ni apelacias al ĉiuj ŝtatoj sekvi la Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj

proklamitan en la jaro 1948.

6. Nun, en la jaro de la 75a datreveno de la akcepto de la Deklaracio de Homaj Rajtoj, ni konstatas

kun zorgo ke tiuj rajtoj ne estas respektataj en multaj partoj de la mondo.

7. Tial ni estas solidaraj kun rifuĝantoj kaj ni emfazas, ke la Homaj Rajtoj estas universalaj rajtoj kiuj

validas por ĉiu individuo tutmonde, ankaŭ por migrantoj.

= =

2023-10 Rusio 1,5 jara milito - kiel tio efikas al la socio

Filmisto de la iama TV-elsendejo „Dozhd“ montras tion. Libro de aŭtoroj kiuj devas sur la antaŭa flanko printi ke ili estas „eksterlandaj agentoj“. Homoj kiuj ne interesiĝas pri la milito - li rimarkis ke la homoj intense klopodas preterpensi ĉi tiun situacion.

<https://www.arte.tv/de/videos/112352-022-A/tracks-east/>

- - -

Simile raporto pri la advokatoj kiuj laboras por defendi homojn kiuj falis en la reton de la justico kiuj agadas por la registaro. Ekz-e por la advokato Michail Benjash.

Kreiĝis civila opozicio kontraŭ la politiko de Putin. Li rakontas pri Umberto Eco kiu priskribas la klasikan faŝismon, kvazaŭ la pra-faŝismon, kiu havas 14 trajtoj. Se estas unu aŭ du - necesas argumenti. Se regas 5 da tiaj trajtoj ĉiu alarmo ne plu funkcias.

Ekzemple: dissens / diversaj opinioj - normale ĝi taŭgas por fruktodona diskuto; sub tia faŝismo temas pri perfido.

Eco komparas la malamon de la administracio kontraŭ opoziciuloj kun la paroladoj de Goebbels.

Ekzemple estis 14-jara N. Uwarow kiu disdonis flugfolion kun kritiko kontraŭ la registaro. Li

ricevis 5-jaran malliberon en pun-gulago.

Karina Moskalenko, fama advokato kiu laboras en Strasburgo por defendi rusojn kiuj protestas je la Eŭropa Jurkorto pri iliaj Homaj Rajtoj. Ŝi ofte sukcesis en kazoj „XY kontraŭ Rusio“. Nun Rusio ne plu akceptas ĉi-tiun Juĝkorton - Rusio subskribis/parafis la Eŭropan Konvencion por la Homaj Rajtoj; tial eblas postuli tie kontraŭ tiu lando.

Ŝi ankaŭ alvokis ĉi-tiun juĝkorton pri la atako de Rusia armeo kontraŭ civilaj strukturoj en la milito de Rusio kontraŭ Ukrainio.

Ŝi ankaŭ kritikis la rusojn - la majoritato de la rusaj civitanoj kiuj ne protestis kontraŭ tiu ne-leĝa milito.

Ŝi volas vidi Putin antaŭ juĝejo. Dokumenta raporto en la germana kaj franca, daŭras ĉ. 1 horon:

<https://www.arte.tv/de/videos/112788-000-A/die-standhaften-russische-anwaelte-vor-gericht/>

= =

2023-09-01 Dmitri Muratow iĝis „Eksterlanda Agento“

Dmitri Muratow ricevis Nobel-Premion pri la Paco - 2021 - kune kun virino el Filipinoj, Maria Ressa - ambaŭ ĵurnalistoj !

La plej opozicia gazeto de Rusio Nowaj Gazeta kalkulas siajn 6 mortintajn ĵurnalistojn: Igor Dominikov, Yuri Shchekochikhin, Anna Politkovskaya, Stas Markelov, Anastasia Baburova und Natalya Estimirova .

Dmitri Muratow ricevis la premion - ankaŭ por la tuta kolektivo. Estis atakita per acidigita koloraĵo - la polico ne agis kontraŭ tiu ĵetanto. Trovis la homon. Li donas la ricevitan 103 Mio \$ de la aŭkcio por la premio-medalon al ukrainaj rifuĝintaj infanoj.

Li tuj parolas pri milito de Rusio kontraŭ Ukrainio. Li plendas pri la aŭtokrata Rusio de la carismo, dum la socialismo, sub Putin. La rusa elito de la registaro ne kuraĝas kritiki lin. W. Kara-Murza estis malliberigita ĉar li skribis pri Nawalny.

Post la militservo en Afganio, li iras al Komsomolskaja Prawda, 1993 al la Nowaja Gazeta - iĝas ĉefa redaktoro. Li kunfondis N.G., i.a. kune kun la iama prezidento de SU, M. Gorbaĉov - kiu rezultis 30 jaroj sen milito.

Portempe ili fondis „Nowaj Gazeta Europa“ - Kiu laboras en Riga. La originala gazeto en Moskvo restis, ĉar la gazeto en Rusio ne rajtas esti publikigita ili elketis alian manieron. Tamen ĝi estis fermita - „ĉar ili semas dubon“ laŭ la juĝisto. Du geredaktoroj estis severe batitaj kaj torturitaj.

NG subtenis ankaŭ homojn: interŝanĝo de militkaptitoj de Ĉeĉenio, infanoj kun stranga malsano.

Dokumentala filmo de 2023-09-19 /ĝis 12-24 dum 88 min pri D.M. en la franca kaj germana lingvoj - parte ruse paroloj de Putin k.a. estas subtitolitaj:

<https://www.arte.tv/de/videos/108685-000-A/rusland-der-wahrheit-verpflichtet/>

= =

2023-09-27 Nawalny - la plej granda opoziciulo de Putin - 1 jaro en izolo

Lia apelacio ne estis akceptita, li devas esti dum 19 jaroj en malliberejo. Por pligravigi tion, li devas esti dum 1 tuta jaro en izola mallibero. Putin ne sukcesis mortigi lin, sed nun li provas tion denove. Fiulo. Nawalny decidis reiri al Rusio post resaniĝo de la unua murdo-

provo.

Jen la informo en la germanaj TV-novaĵoj:

<https://www.tagesschau.de/newsticker/liveblog-ukraine-mittwoch-288.html>

Komento de AVE/mw: Mi esperas ke Nawalny restos viva ĝis Putin finfine foriros - supozeble an Nordan Koreion

- - -

2023-09-27 Armenio - ne plu armenoj en Montara Karabaĥ ?

Tiu regiono (armen-lingve Arzaĥ) formale apartenas al Azerbajdŝano, sed tie loĝis de longe ĉefe (komence preskaŭ nur) armenoj. Mi legis bazan artikolon, ke tio estas heredaĵo de Stalin, simile kiel la nunaj orientaj limoj de Pollando (ĉi-kaze de Hitler kun Stalin)* . Lia politiko celis dividi la popolojn, tial li ankaŭ transportigis homojn el okcidentaj provincoj de SU al Siberio, kaj li replenis la truojn per etnaj rusoj.*. Li decidis la limon de soveta respubliko Armenio sen ĉi-tiu regiono.

Tute koncize: Post streĉa situacio (ambaŭflanke) Azerbajdŝan 2020 okupis parton de tiu regiono. Dank' al interveno de Rusio ne okazis longa milito, sed tamen Rusio ne sukcesis garantii liberigi la solan straton inter Arzaĥ kaj Armenio. La armenaj homoj tie - inter 120 - 145 mil - ricevis nenion de ekstero dum pli ol 3 monatoj. Ili preskaŭ malsat-mortis. Finfine Azerbajdŝano okupis ĉi-tiun regionon kaj ofertis la armenojn fuĝi al Armenio.

<https://www.tagesschau.de/ausland/asien/bergkarabach-fluechtlinge-100.html>

<https://taz.de/Nach-dem-Krieg-um-Bergkarabach/!5959760&s=Armenian/>

kaj en la sama gazeto: J. Gottschlich, taz, 2023-09-23, p.2

*) Pri la pakto inter Hitler kaj Stalin ekzistas konciza broŝuro el Litovio: „Konspiro“ - kiu ankaŭ entenas la tekstojn de la adiciaj (sekretaj) amendoj.

Tio jam nun estas problemo en Estonio, Latvio, orienta Ukraino, Krimeo, orienta Moldavio, ktp.

Mirinde ke okazis simpla interŝanĝo de la etnaj homoj en Kasaĥio, kion oni montris al mi ekzemple en Barnaul.

= =

2023-09-22 Desinformado kiel armilo

En la serio „Mit offenen Karten“ ĉi-foje temas pri falsaj informoj.

Desinformo: intence falsigitaj informoj: ekz-e „Operacio Infektado“ - ke la AIDS-viruso estis disvastigita el Usono;

Malĝusta informo: falsaj informoj, sed ne intence produktitaj:

Malinformo: nur parto de la informo ĝustas, sed tiu estis intence disvastigita, ekz-e por argumenti ke tuta Ukraino estis naziisma.

Metodoj: Mola propagando: la ĉina ambasadoro en Francio LU Shaye neas la atakojn kontraŭ la ujugura etno. Li ankaŭ pridubas ke la post-sovetiaj ŝtatoj estas vere sendependaj.

Absoluta kontrolo pri amasmedioj: pluraj ekzemploj el Rusio (RT, ...), Irano kaj P.R.Ĉinio

Griza propagando: grupo „Ghostwriter“ el Belarus transportas informojn el Rusio al la okcidentaj najbaroj, kaj/aŭ hakas retpaĝojn. Ekz-e ke la Kronviruso venis de Usono. Troloj skribas malĝustajn informojn en la sociajn retojn (Fejzbuk kaj Instagram).

Progoshin fondis la „Agenturon por Internet-esploro“

<https://www.arte.tv/de/videos/114573-003-A/mit-offenen-karten/>

--

2023-09 Komunisma Partio en Rusio - sola opozicio ?

Evidente Putin ne povas malpermesi la komunisman partion. En video-dokumento Svetlana la komunista kandidatino en Ivanovo por la parlamento rakontas ke iliaj elekto-nombroj ene la la nokto post la baloto estis reduktitaj. Tamen ili estas aktivaj kaj akceptataj de iom da homoj, inkluzive gejunuloj.

<https://www.arte.tv/de/videos/106006-000-A/rusland-die-kommunisten-wittern-morgenluft/>

= =

2023 Ĝihadismo - radikala islamo

tri-parta dokumentado:

Komencis (ekzemple en 1979 kiam rusoj alvenas en Afghanio; Abdallah Azzam fondas la modernan ĝihad kaj batalas kontraŭ la rusoj. Laŭ la araba tio signifas persistemo sur la vojo al Allaho. Informo en Esperanto sur Vikipedio.org .

Iam poste 1987 la juna Usama Bin Laden dividiĝas de iu grupo kaj batalas ekster Afghanio: Al Kaida !

1992 en Bosnio-Hercegovino okazas civila milito inter kristanaj serboj kaj bosniaj muslimoj. Ili ricevas subtenon de Al Kaida. Serbio okazigas t.n. etna purigo.

La afghanaj muslimoj enkondukas la Ŝarija; kio ne konvenas kun la bosnia kulturo.

La ĝihadistoj masakras 50 serbojn (civilistojn kaj soldatojn), kvazaxu ne-rimarkite.

Serbaj soldatoj disdividas 8000 muslimajn civilulojn en Srebrenica de iliaj edzinoj kaj infanoj, kaj mortigas ilin, kvazaŭ sub la okuloj de la UN-Blukaskuloj. La ĝihadistoj ricevas subtenon de muslimaj junaj rifuĝintaj viroj el Londono. Tie ili estis incititaj de imamoj; religio iĝis ideologio. Ili celas islamani fondi kalifaton en Britio. Abu Hamza revenis el Afghanio, kaj fondas novan islamistan grupon en londona moskeo. La registaro en Britio ne rimarkis ke tie kreskas kvazaŭ eksterlanda armeo - Londonistan, kiu nutras la ĝihadismon en Francio. Je 25a de Juli 1995 ĝihadistoj faras masakron en stacidomo St. Michel en Parizo (4 mortintoj kaj 40 vunditoj). Ŝajnas ke estas respondo al la milito de Francio kontraŭ la sendependeco de Alĝerio. Okazas pluraj atencoj en parizo.

Ankaŭ en Danio envenis ĝihadismo, ekz-e iu el Egipto, grandaj kontroloj ne okazis.

1981 en Kairo okazis militara parado, dum kio okazis, organizita de Abu Talal, la atenco de 4 oficioj kontraŭ la prezidento Anwar As-Sadat. Inter tiuj ĝihadistoj estis Al-Zawahiri, kiu poste aliĝas al Ibn Laden, kaj organizis la sekvajn atencojn.

1996 Abd ar-Rahman, muzik-staro, fakte predikis kontraŭ la okcidenta kulturo. Poste li ricevis politikan azilon en Nov Jorko.

En Februaro 1993 eksplodis bombo en aŭto en la World Trade Center, kiam mortis 6 homoj kaj 600 estis vunditaj !

1995 Post la milito en Bosnio, kaj la kontrakto de Dayton, la eksterlandaj batalantoj devas forlasi la landon.

1998-10-07 Al la US-ambasadejo de Nairobi kaj samtempe en Dar es Salaam okazis atencoj - organizitaj de Bin Laden.

2001-09-11 okazis la atako al al World Trade Center en Nov Jorko.

<https://www.arte.tv/de/videos/101351-001-A/dschihad-europas-gotteskrieger-1-3/>

- - - -

2022-10-14 Denuncado - nova sporto en Rusio - rememoro al Stalin-aj tempoj:

Dokumenta filmeto pri la aktuala kvanto da denuncioj, kaj la sekvo de tio pere de la polico: 13 minutoj, en 6 lingvoj, videbla ĝis 2052:

<https://www.arte.tv/de/videos/115924-000-A/rusland-der-terror-der-denunziation/>

- -

2023-07-22 Rusio spionas infrastrukturon de europa energio

Dokumenta filmo el Skandinavio montras la uzadon de rusiaj ŝipoj en la Balta Maro kaj en la Norda Maro inter Britio kaj Europo. Paralele okazis rusia kaŝo-agadoj flanke de rusiaj aŭtoritatuloj - ili celas malcertigi la civitanojn en la okcidentaj ŝtatoj.

Monitorado (per funkaj kaj satelitaj informoj) de ĉi-tiuj malmultaj ŝipoj, ekzemple trifoja krosado de Sibirjakov de Kronstadt (Rusio) al la loko kie pli poste iu eksplodigis la novan gaso-dukton North Stream II. Krome ili montris ke ili celis vitro-fibraj dateno-kabloj kaj la kampojn da ventogeneratoroj en ambaŭ maraj regionoj. Tio estas elementoj de hibrida milito-agado.

Aŭdebla en la franca kaj germana, 52 min, videbla ĝis fino de 2026:

<https://www.arte.tv/de/videos/115177-000-A/putins-schattenkrieg-russische-spionage-in-der-ostsee/>

- -

2023-07 Serio da 13 plejparte koncizaj video-informoj pri Ukrainio - en la germana:

Ili substrekas la validecon de ukraina memstareco kaj kultura aŭtonomio.

<https://www.zois-berlin.de/mediathek/was-man-ueber-die-ukraine-wissen-sollte>

- - -

2023-07 Balta Maro Rusio & NATO

Jen informoj pri la ŝanĝoj en la regiono de la Balta Maro. Post la sendependiĝo de la baltiaj ŝtatoj kaj nun la aliĝo de Finnlando al NATO - pro la neatendita agreso de Rusio kontraŭ Ukrainio - pli kaj pli da bordo apartenas al NATO. Ĝis nun la hungara kaj turka prezidentoj bremsas la aliĝon de Svedio.

Jen dokumenta filmo en la franca kaj germana - videbla ĝis Oktobro 2023:

Ĝi montras ankaŭ la tempon de la 80-aj jaroj. Oni opinias ke la montrado de usona aviadilportanta ŝipo influis la politikon de Rusio. Ili metis atomarmilojn al la regiono de Kaliningrado (iama Königsberg). Ankaŭ

TU 160 estas la plej danĝera bombo-aviadilo de Rusio; kaj ofte flugas sen transponder super la Balta Maro. Tio sen-regula flugado estas ankaŭ danĝera al civilaj aviadiloj dum paca tempo.

<https://www.arte.tv/de/videos/111735-000-A/aufreuesten-gegen-putin-die-nato-in-der-ostsee/>

= =

2023-07-07 Grapolbomboj por Ukrainio

Rusio kaj Ukrainio uzas grapolbombojn - la Konvencio pri Grapolbomboj de 2008 malpermesas la uzon de tiuj fiaj armiloj; aparte ĉar parto de tiuj ne tuj eksplodas, sed

restas sur la grundo, kaj endanĝerigas homojn kaj bestojn. Bedaŭrinde ĉi-tiuj landoj kune kun Usono ne akceptis la konvencion.

Nun Usono intencas sendi tiajn al Ukrainjo, laŭdire plej kvalitaj, kiuj (plejparte) tuj eksplodas post la falo al la tero. Ĉiukaze Germanio ne pretas sendi tiajn armilojn - mi esperas ke oni detruis la tutan stokon.

Lau informo ĉ. 700 homoj mortis en Ukrainjo pro rusaj grapolbomoj, parte ĉar ili ne-intence paŝis al kaŝita bombeto.

<https://www.tagesschau.de/ausland/europa/ukraine-streumuniton-102.html>

- - -

2023-07-07 Milito de Rusio: Bilanco de mortigitaj civilaj personoj :

UN nombris pli ol 9.000 mortigitaj kaj 16.000 vunditaj en Ukrainjo.

Sur Krimeo estis 6 mortigitaj, kaj 16 vunditaj.

En Rusio ili kalkulis 58 mortigitaj kaj 229 vunditaj civiluloj.

<https://www.tagesschau.de/ausland/europa/un-opferzahlen-ukraine-100.html>

- -

2023-05 Putina metodo

Jen 3 dokumentaj filmoj pri la batalo de Putin por resti diktatoro.

Neniigi kritikantojn (ne ĉiuj mortis): A. W. Litvinenko, B.J. Nemcov, Skripal, Navalni, Magnitsky, A.A. Sobĉak, A.S. Politkovskaja,

Malliberigo: Kara-Murza, Navalnyj, Ĥodorkovski (Chodorkovsky),

Jen detalaj informoj:

<https://www.iswresearch.org/search/label/Ukraine/>

Kaj jen 3 dokumentaj filmoj (en la jenaj lingvoj: de, en, es, fr, pl, it) kiuj montras la manieron de Putin mortigi homojn per venenoj - kiuj malplaĉis al li:

Entute trafitaj homoj, ne ĉiuj mortis, dank' al rapida kuracado:

A. W. Litvinenko, B.J. Nemcov, Skripal, Navalny, Magnitsky, A.A. Sobĉak, A.S. Politkovskaja,

Homoj kiuj dum longa tempo estis/-as en malliberejo: Kara-Murza, Navalny, Ĥodorkovski (Chodorkovsky);

Kleptokratio: Samtempe temas pri la giganta riĉeco kiun Putin akiris, ĉar la oligarĥoj devis doni al li (nerekte) 40% de ilia posedaĵo. Nawalny informis pri tio.

Alexander Litvinenko (killed by Polonium in London), Anna Politkovskaya (shot down in front of her flat), Sergey Magnitsky (killed in russian detention):

<https://www.arte.tv/en/videos/103961-000-A/putin-s-poison-1-3/>

Sergey Skripal and his daughter (poisoned, survived), Boris Nemcow (shot down on Moskwa bridge near Kreml), Wladimir Kara Murza (poisoned twice, detentioned), stop of "Echo Moskwy"; then the Magnitsky Act (USA) as basis for personal sanctions;

<https://www.arte.tv/en/videos/103962-000-A/putin-s-gift-2-3/>

Alexej Navalnij (poisoned, back to Russia, detentioned), his public documentary about the miliard-investments of Putin; Lukashenko as illegal president of Belarus; begin of Putins war against Ukraine; 500 political prisoners in Russia; Kara-Murza (detentioned for 15 years because he opposed the war, under very bad situation); A. Nawalny (statement during detention); detentioning of civilians who publicly oppose the war):

<https://www.arte.tv/en/videos/112783-000-A/putin-s-gift-3-3/>

- - -

2023-06-23 Putin mensogas

Prigoshin kritikis al Putin, ke lia argumentado estas mensogo:

<https://www.tagesschau.de/ausland/europa/ukraine-krieg-prigoschin-102.html>

Prigoschin stellt Kriegsgründe in Frage

Den ganzen Tag über hatte Prigoschin heftig gegen die Militärführung in Moskau gewettert - und deren offizielle Kriegsgründe infrage gestellt. Entgegen der russischen Propaganda-Behauptung sagte Prigoschin in einem Video, Russland sei vor Kriegsbeginn im Februar 2022 überhaupt nicht durch die Ukraine gefährdet gewesen. Die angeblich "wahnsinnige Aggression" vonseiten Kiews und der NATO habe es so nie gegeben.

"Das Verteidigungsministerium versucht, den Präsidenten und die Öffentlichkeit zu täuschen", sagte Prigoschin, der sich bereits seit Monaten in einem internen Machtkampf mit Schoigu befindet. "Die militärische Spezial-Operation wurde aus ganz anderen Gründen begonnen." Dann fügte der Wagner-Chef hinzu: "Der Krieg war notwendig, damit Schoigu den Titel eines Marschalls erhält. (...) Und nicht, um die Ukraine zu demilitarisieren und zu denazifizieren." Außerdem hätten sich russische und prorussische Oligarchen Vorteile von dem Krieg erhofft, sagte Prigoschin.

Russland rechtfertigt seinen Angriffskrieg immer wieder mit der Propagandabeauptung, das Nachbarland von angeblichen "Neonazis" zu befreien. Ein weiterer Kriegsvorwand ist die durch nichts belegte Behauptung, Kiew hätte Moskau mithilfe der NATO angreifen wollen.

= =

2023-07 Israela registaro maltaŭge reagis en la Okcidenta Bordo (West Bank) de Palesteno

Kiel germano mi ne tro rajtas/emas kritiki la politikon de Israelo konkeri paŝeton-al-paŝeto la tutan teritorion de Israelo-Palesteno. Mi ja konas la pozitivan argumenton de KKL, ke judoj sentos sin sekuraj nur en sia historia loko, dum arabaj loĝantoj tie (i.i. beduenoj) povus setli en la granda „araba mondo“ - anstataŭ resti dum generacioj en rifuĝejoj.

Sed la nunaj perfortaj reagoj al protestoj de palestenanoj plie semas malamon.

Jen detala informo kaj komento de internacia medicina help-organizaĵo - jen en 4 lingvoj (de, en, es, fr):

<https://www.medico.de/blog/israelische-unsicherheitspolitik-19144>

- - -

2023-07-05 / 07-23 germana rezistanco - Edelweißpiraten en Kolonjo

Jen dokumenta filmo (52 min, en la franca kaj germana) pri grupo da gejunuloj kiuj kontraŭis la nazian sistemon en la jaroj 1941 - 44, subtenis grupeton da kaŝitaj judoj, kaj diversmaniere batalis kontraŭ la nazia administrado. Same kile la „Blanka Rozo“ en Munkeno, ili skribis parolojn al muroj, gluis afiŝojn.

Plej multaj estis kaptiaj kaj post torturado ekzekutitaj. Bedaŭrinde la nazi-juristoj pli rapide ricevis sian (ne-meritan) honoron, kaj kvazaŭ post-mortem denove denunciis ilin. Kaj nur post longa tempo, kaj subtenita de Jad Vashem ebligis redoni al ili la homan dignon, ke ili agis juste kontraŭ maljusta, faŝista teror-sistemo. Ilia rememoro troviĝas i.a. en urboparto Ehrenfeld de Kolonjo, kie sub fervoja ponto kvazaŭ estas rememloko por ili.

<https://www.arte.tv/fr/videos/110284-000-A/les-pirates-de-l-edelweiss-une-jeunesse->

contre-hitler/

<https://www.arte.tv/de/videos/110284-000-A/jugendliche-im-widerstand-edelweisspiraten/>

Jen pliaj informoj en pluraj lingvoj, inter ili en Esperanto, sed iom koncize:

https://en.wikipedia.org/wiki/Edelweiss_Pirates

--

2023-07-03 Historiisto S. Plochy analizas la situacion en Rusio

Li verkis grandan historion pri Ukraino „Die Geschichte der Ukraine“ ĝis la jaro 2015, kaj nun eldonis libron „Der Angriff“ - do, pri la milito de Putin kontraŭ Ukraino.

En tiu granda intervjuo li diras i.a. „La mensogo-konstruaĵo de Putin, ke Ukraino ne estas nacio - rompiĝis. Krome li detruis la „Rusan Mondon“.

https://www.t-online.de/nachrichten/ausland/krisen/id_100194208/historiker-plochy-putin-hat-die-russische-welt-zerstoert-.html

2023-07 Rusio akaparis ukrainajn infanojn - krimoj kontraŭ Homaj Rajtoj

Ekde komenco de la rusa milito kontraŭ Ukraino Rusio akaparis inter 16.000 kaj 20.000 da infanoj el familioj en Ukraino. Tiu politiko apartenas al la celo neniigi ukrainan kulturon, ĉar kulturo baziĝas sur homoj (pri tio rilate muezoj, bibliotekoj, monumentoj sekvas alia dokumento).

Nur malfacile eblas al la familioj trovi siajn infanojn, kaj malpli facile re-ricevi ilin.

<https://www.n-tv.de/politik/Nach-Russland-verschleppt-31-Kinder-koennen-in-Ukraine-zurueckkehren-article24041422.html>

Jen en la angla pri diversaj rusaj krimoj kontraŭ homaj rajtoj:

<https://corporate.dw.com/en/delivering-justice-for-the-war-crimes-in-ukraine/a-65646993>

Jen ĝenerala retejo pri tio en multaj lingvoj, ankaŭ pri akaparo de infanoj:

https://fr.wikipedia.org/wiki/Crimes_de_guerre_lors_de_l%27invasion_russe_de_l%27Ukraine_en_2022

= =

2023-06-29 Europa Parlamento klopodas solvi plurajn problemojn:

- tro multaj enmigrintoj - plej ofte temas pri rifuĝintoj; la „eleganta“ solvo estas haltigi ilin antaŭ la EU-limoj, tie kontroli ilin, kaj decidi ĉu ili rajtas peti pri azilo. La pli eleganta solvo estas inviti tiujn kiuj tuj povas eklabori; sed multaj rifuĝintoj ne povas eklabori rapide en nia mondo. Pollando kaj Hungario ne akceptas ke ili poste ricevu kelkajn de tiaj rajtigataj migrintoj; ĉar ili timas fremdajn influojn, sed ankaŭ ne volas pagi anstataŭe.

- klimato, naturprotektado, reduktado da pesticidoj. Hodiaŭ mi vidis/aŭdis ke PR Ĉinio sukcesis subfosi la FAO (UN-organizaĵo pri nutraĵo kaj agrikulturo) pere de pluraj propraj personoj, kiuj ekzemple organizis ke kelkaj ne plu akcepteblaj pesticidoj povas esti tamen eksportataj al afrikaj landoj - kaj tie okazas pli ofte venenigoj de kamparanoj kiuj aplikis ilin.

<https://www.ardaudiothek.de/episode/11km-der-tagesschau-podcast/china-essen-ernaehrungsorganisation-auf/tagesschau/94569078/>

- PR Ĉinio postulas de aliaj landoj akcepti ke Tajvano ne estas memstara lando. Litovio akceptis oficialan oficejon de Tajvano en Vilnius. EU celas redukti la dependecon de PR Ĉinio (t.n. derisking), ĉar oni rimarkis ke tiu lando celas superi ĉiujn aliajn naciojn per ajnaj

manieroj. Jen la komento de Verdulo en la EP:

<https://reinhardbuetikofer.eu/2023/06/30/peking-mag-de-risking-nicht/>

- - -

2023-06-30 Ekrompiĝis la povo de Putin:

La rusa ĵurnalistino Masha Borzunova analizas la aferon kiun kaŭzis Prigoshin - en la franca kaj germana:

<https://www.arte.tv/de/videos/115611-001-A/der-wagner-aufstand-im-russischen-staats-tv/>

Krome:

Jen intervjuo kun Michail Chodorkowski - el ekzilo - iama oligarĥo kiun malproprigis Putin, ĉar li intencis kandidatiĝi por prezidenteco. En la germana, sed la ruslingvaj respondoj estas bone auskulteblaj:

<https://www.tagesschau.de/ausland/europa/chodorkowski-russland-100.html>

- - -

2023-06-25 Opozicio = Komunista Partio en Rusio

Jen konciza raporto pri homoj de la komunista partio en Rusio. La sola partio kiu signifas vera opozicio kontraŭ la partio de la prezidento.

Jen dokumenta filmeto (12 min) en 6 lingvoj (fr, de kaj subtitolita en, es, it, pl), videbla dum longa tempo:

<https://www.arte.tv/de/videos/106006-000-A/russland-die-kommunisten-wittern-morgenluft/>

- - -

Verda Partio ekzistas en Rusio, kune kun Jabloko (de la iama profesoro P.A. Jablokov), sed ne havas sidon en la Duma (federacia parlamento).- kaj la retejo ne estas aktuala (lastaj informoj de 2018). Tamen ili ĝis nun aperas kiel membro de Europeangreens.eu. Jen ilia retejo kun ampleksa paĝo pri ekologiaj libroj.

<https://rus-green.ru/biblioteka>

- - -

Jen dokumento de „Dozhd“ - en ekzilo - pri propagando en Rusio: 29 min, en la samaj lingvoj:

<https://www.arte.tv/de/videos/112352-001-A/tracks-east/>

<https://www.arte.tv/en/videos/112352-001-A/tracks-east/>

= =

2023-06-03 „Osoba Odra“ Mi esperas ke tiu iniciativo en Pollando havu bonan rezulton. (pli pri Odro, vidu la ĉapitron Ekologio)

Bedaŭrinde la PiS-registaro pli kaj pli forlasas la bonan demokratian direkton de sendependeco de la 3 fortoj de la ŝtato: leĝdonado (parlamento) - regado - juĝado. EU blokas kelkajn subtenmonojn pro mistraktado de tiaj principoj. La reformo de la juĝ-sektoro 2019 nun estis malakceptita de la Europa Juĝkortumo en Luksemburgo.

Aktuale la ministroprezidento (ĉefministro) J. Kaĉynski kreis komisionon kiu rajtas esplori (kaj dumtempe malliberigi ?) ĉiujn civitanojn pri eventuala "rusa influo". Du polaj ĵurnalistoj skribis politikan kolumnon en (taz, 2023-06-03, p. 14) pri tiu komisiono kiun akceptis la prezidento Duda. Ili opinias, ke tiamaniere Kaĉynski volas eviti ke Donald Tusk iĝos kandidato por la sekva elekto de la parlamento. Ili skribas ke Kaĉynski eĉ nun kredas ke la aviadilo-katastrofo en Smolensk, dum

kiu lia frato Leĥ mortis, estis organizita de Rusio. Laŭ mia informo estis dika nebulo sur la malgranda militara flughaveno en arbaro, kaj la pilotoj estis petitaj daŭrigi la flugon al proksima flughaveno. Oni supozas ke la pilotoj estis (pli aŭ malpli) devigitaj provi la surterenigon.

Jen interesaj detaloj (ankaŭ en aliaj lingvoj): https://eo.wikipedia.org/wiki/Kra%C5%9Do_de_la_pola_prezidenta_aviadilo_en_2010

Jen komenco de la Polan Himno: Jeszcze Polska nie zginęła, Kiedy my żyjemy.

- - -

2023-06-01 Naqba - 75 jaroj - ĝis nun mankas paca kunloĝado en Israelo & Palesteno

Jen artikolo de Alain Gresh, de Le Monde Diplomatique, raportas kaj diskutas pri la aktuala politiko de Israelo - priskribita en la konstitucio de 2018 - fakte kontraŭ palestenanoj, kion oni povus deklari Apartheid. Aliflanke judaj organizaĵoj preferas pacan kunvivadon kun palestenanoj, ekzemple Gush Shalom, kie Uri Avnery aktivis.

(en la germana) <https://senderfreiespalaestina.de/pdfs/von-der-kolonialisierung-direkt-zur-apartheid.pdf>

(lingvoj: ar, en, es, fr kaj farsi ?) <https://orientxxi.info/magazine/israel-palastine-from-colonisation-straight-to-apartheid,6407>

- - -

2023-05-24 Rusio akaparadas posedaĵojn de ukajnanoj sur Krimeo

Putin nomas tiujn homojn „malamikoj de Rusio“. Laŭ la nova guberniestro Aksjonov, parto de tiuj posedaĵoj iĝos posedaĵoj de la Respubliko Krimeo. Inter aliaj temas pri la konstruaĵo de Medshlis, la parlamento de la krimeo-tataroj. La malmultaj tataroj kiuj revenis post la stalina deportacio, estis forpelitaj de la „afablaj homoj“, rusaj soldatoj sen ŝtataj emblemoj kiuj organizis ke la parlamento de la Autonomia Respubliko Krimeo decidis la sendependecon (de Ukrainio), kaj ili tuj poste petis anekson al Rusio, kiun Rusio rapide akceptis - jen detaloj:

<https://eo.wikipedia.org/wiki/Krimeo>

En la angla kun informo pri tiuj „verdaj viretoj“ :

https://en.wikipedia.org/wiki/Russian_occupation_of_Crimea

(publika letero de rusaj scienculoj (Feb 2022) kontraŭ tiu milito de Rusio kontraŭ Ukrainio, kun listo de la subskribintoj - tie per butono trovebla ankaŭ en la angla (sen tiuj nomoj) :

<https://www.t-invariant.org/2022/02/we-are-against-war/>

= =

1933-05-10 rememoro: Tago de Libro-bruligado en nazia Germanio

1821 Heinrich Heine profetis „Tiu ĉi estis nur enkonduko. Kie libroj estas bruligitaj, tie homoj fine ankaŭ brulos.“ Li skribis ĉi-tiun frazon en sia libro „Almanson“ - tiam temis pri bruligo de la Korano kaj aliaj libroj de islamaj verkistoj, kio estis organizita de la ĉefepiskopo post kiam kristanaj kavaliroj konkeris Granada (en 1499). Escepte pri-medicinajn librojn li sendis al la nova universitata biblioteko Alcalá.

En Bonn, Germanio, ĉiujare okazas rememora kunveno antaŭ la urbodomo. Tie en la pavimon enmetitaj estas multaj libroj, kiuj 1933 estis bruligitaj. Kaj ĉiujare okazas legado el tiaj libroj:

<https://www.bonn.de/themen-entdecken/bildung-lernen/jahrestag-buecherverbrennung.php>

https://eo.wikipedia.org/wiki/Bruligo_de_libroj_en_Nazia_Germanio

= =

2023-05-03 Monda Tago de Gazetara Libereco

https://eo.wikipedia.org/wiki/Monda_Tago_de_Gazetarlibereco

Jen indekso pri la bonaj kaj malbonaj landoj. Norvegio estas preskaŭ perfekta, Rusio ege malboniĝis - je numero 155 (de 180) por la jaro 2022; sed por 2023 estos malpli bone - ne nur por la gazetoj, sed ankaŭ por interretaj informiloj.

https://en.wikipedia.org/wiki/Media_freedom_in_Russia

https://de.wikipedia.org/wiki/Rangliste_der_Pressefreiheit

Komento de AVE/mw: sendependa informo gravas por ekscii kio vere okazas. Kaj legi/aŭskulti diversajn informfontojn ankaŭ gravas ĉar ne ĉiuj estas same fidindaj kaj sekvas specialajn interesojn. Kompreneble falsaj informoj ne apartenas al tiu libereco. Sed estas griza zono inter vero kaj malvero.

- -

2023-04-29 Opozicio en Rusio kaj en ekzilo

jen ekzemploj kiel ne eblas opozicii en Rusio, sed en ekzilo.

Estas multaj plej ofte junaj rusoj kaj rusinoj kiuj kontraŭas la putinisman reĝimon de falsajtoj, korupta justico - kiu punas ege tro severa la kritikantojn de la nuna sistemo. Aparta versio de faŝismo. Sed ankaŭ tiu iam finos - tio estas unu el la bazaj leĝoj de la homa kaj socia vivo. Jen la dokumento (30 min, en pluraj lingvoj: de, en, es, fr):

<https://www.arte.tv/en/videos/112352-008-A/tracks-east/>

Amnestio Internacia prezentas plurajn temojn pri la kontraŭleĝa konduto de la rusia sistemo kontraŭ opoziciuloj:

<https://www.amnesty.de/informieren/amnesty-report/russland-2022#section-23581476>

Kaj jen en 4 lingvoj: ar, en, es, fr - ekzemple pri la tataroj en Krimeo - ilia jura defendantino ne rajtas partopreni en la Advokata Ĉambro de Krimeo.

<https://www.amnesty.org/en/documents/eur46/6712/2023/en/>

Jen pri Lilia Hemedzhy - en la angla, franca kaj rusa lingvoj:

<https://www.frontlinedefenders.org/en/profile/lilia-hemedzhy>

Komento de AVE/mw: inter la plej konataj malliberigitaj opoziciuloj estas:

Alexej Nawalny, Ilja Jashin, Wladimir Kara-Mursa,

Ilia „krimo“ estis ke ili kritikis la militon de Rusio kontraŭ Ukraino - oni asertas ke temas pri „Speciala Militara Operacio“ laŭ Art. 51 de la UN-Ĉarto. Samtempe veraj krimuloj militas en tiu milito por la privata armeo de Prigoŝin; kiu havas bonŝancon liberiĝos, sed multaj mortas ĉar la armeo de la „kuiristo“ estas malbone ekipita kaj devigas la soldatojn agresi, sen atento de la propra sekureco. Kompreneble ni ne volas ke ili mortas tie; sed ĉiukaze ke ili ne mortigu.

En nia manifestacio antaŭ la Ĝenerala Konsulejo de Rusio en Bonn mi prezentas afiŝon kun granda nombro de mortitoj pro tiu milito - nuntempe 280.000 (ekzaktan nombron neniu scias) - kaj sub tiu nombro estas kaj la ukraina kaj la rusa flagoj; ĉar ankaŭ familianoj kaj geamikoj de la rusaj soldatoj pleje funebras pro ili.

- -

2023-04 Soldatoj de Rusio - ne volas esti nutrado por kanonoj !

Dum Ukraino ricevas pli kaj pli da modernaj armiloj, kaj Putin - kies milito nun okazas - parolas pri atomarmiloj. Aliflanke mortas multe pli da rusaj soldatoj, ol ukrainaj (mi dirus, bedaŭrinde bone) - tamen mi preferus ke ili ne mortas, sed restos hejme. Jen ankaŭ video de soldatoj el Siberio kiuj komune sendis peton al Putin por ricevi pli bonajn armilojn kaj edukadon:

<https://www.arte.tv/de/videos/112907-013-A/arte-europa-die-woche/>

= =

2023-04-22 Ĉu ankaŭ P.R.Ĉinio sonĝas simile kiel Putin pri Sovetunio ?

Unuflanke la p.r.ĉina prezidento Xi prezentis 10-punktan planon kiel fini la militon de Rusio kontraŭ Ukraino. Sed la vortumo sonas tre ĝenerale, oni evitis klarajn menciojn; tamen klaras ke Rusio devus akcepti la limojn de la najbara Ukraino*. Laŭ tio Rusio devus repreni la soldatojn malantaŭ la limojn de 1994.

Sed nun okazis „klarigo“ - aŭ eble „misklarigo“ flanke de ambasadoro de P.R.Ĉinio en Francio, Lu Shaye, kiu respondis al peto klarigi kion li diris: „En la Popol-Rajto eĉ tiuj landoj de iama Sovetunio ne havas efektivan statuson, ĉar mankas internacia interkonsento, por konkretigi ilian statuson kiel suverena lando.“

Por la baltiaj ŝtatoj - kiuj laŭ tiu vidpunkto ne havus la rajton je suvereneco - protestis je tiu tago la latva ministro pri eksteraj aferoj, Edgars Rinkevics, pri tiuj „plene malakcepteblaj“ rimarkoj de tiu ĉina reprezentanto.

Jen la intervjuo - en la franca: <https://twitter.com/LCI/status/1649494075358294016>

*) La plena kunveno de UN menciis tiujn limojn, voĉdoninte kontraŭ tiu milito de Putin per giganta majoritato - kiujn havis la iama sovetia respubliko Ukraino, kiujn Rusio mem garantiis en 1994.

Simile temas pri Tajvano, kiu sentas sin kiel suverena ŝtato ek de 1949; ili eĉ reprezentis Ĉinion en la UN ĝis 1971. Kaj neniam estis regata de la nuna P.R. Ĉinio. Sed nun P.R.Ĉinio estas la sola oficiale akceptita ĉina ŝtato. Mi ne scias kial Tajvano ne povas esti akceptata suverena ŝtato ?

- - -

Die baltischen Staaten haben mit Empörung auf Äußerungen des chinesischen Botschafters in Frankreich reagiert, wonach Ex-Sowjetrepubliken nicht notwendigerweise souverän seien. Wegen der „völlig inakzeptablen“ Bemerkungen habe er für Montag den Geschäftsträger der chinesischen Botschaft in Riga einbestellt, teilte Lettlands Außenminister Edgars Rinkevics am Samstagabend auf Twitter mit. Dieser Schritt sei mit Litauen und Estland abgestimmt. „Wir erwarten von chinesischer Seite eine Erklärung und eine vollständige Rücknahme dieser Aussage“, schrieb der Chefdiplomat des baltischen EU- und Nato-Land weiter.

In einem [Interview im französischen Fernsehen](#) hatte der chinesische Botschafter Lu Shaye zuvor die Souveränität von Staaten in Frage gestellt, die einst der Teil Sowjetunion waren. Auf die Frage, ob die Krim zur Ukraine gehöre, sagte der Diplomat, es hänge alles davon ab, wie man dieses Problem betrachte. Einer Intervention des Moderators, dass die von Russland seit 2014 besetzte Schwarzmeer-Halbinsel völkerrechtlich ein Teil der Ukraine sei, entgegnete Shaye: „Im Völkerrecht haben selbst diese Länder der ehemaligen Sowjetunion keinen effektiven Status, weil es kein internationales Abkommen gibt, um ihren Status als souveränes Land zu konkretisieren.“

- - -

2023-04-09 Marijnka - totale detruita de Putinaj soldatoj

Urbeto en Donbas-regiono, je la limo al la ruse okupita teritorio; la rusa armeo ankaŭ uzas

fosfor-bombojn. Jen dokumenta filmeto:

<https://www.arte.tv/de/videos/113043-037-A/ukrainische-reporter-innen-berichten/>

- - -

Odessa Classics - fondita de pianisto Alexey Botvinovs - de Tallinn

Li kun Daniel Hope (violono) ludas kun la nacia simfonia orkestro de Estonio:

Ukrainische Nationalhymne

Benjamin Britten, Viollinkonzert in D-Moll Op.15

Wolfgang Amadeus Mozart, 20. Klavierkonzert in D-Moll, KV 466

Myroslav Skoryk - Melody

<https://www.arte.tv/de/videos/109334-000-A/estnisches-nationales-symphonieorchester/>

- -

2023-04-19 Komenco de la Ribelo en la Varsovia Geto antaŭ 80 jaroj

Tia genocido estas ne la sola sur la Tero, sed la plej grandskala (pri krueleco ne eblas kompari).

Rememoro al Ŝoah.

1940 - 1943 La vivo de la judoj en la getto de Varsovio

raporto kun dokumentoj kaj filmoj (kaj filmitaj scenoj lau tiaj rakontoj), fotoj kaj komentoj de nuntempaj fakuloj.

La arkivo Oyneg Shabbes kolektas raportojn, instigita kaj organizita de Emanuel Ringelblum. Nigra merkato. Ankaŭ ili kolektis ĵurnalojn kaj ĉiutagajn dokumentojn, inter ili tiuj de la naziaj okupantoj. Kruelecoj. Ankaŭ pri la amasa mortigo de judoj en pluraj urboj de Pollando - dank' al polaj subgrunduloj ili povis sendi komence de 1942 la informon pri la sistema genocido al Londono. BBC elsendis tion. Kiam Ringelblum komprenis ke eble neniu postvivus ĉi tie, li organizis la kaŝadon de la raportoj en granda fosita truo sub la planko, kaj nur iom post la milito eblis trovi la kestojn kun tiaj kajeroj, kiujn plenigis homoj kun siaj rakontoj. Je Pasko 1943 okazis la ribelo de la judoj en la geto de Varsovio. Ili preferis morti dum batalo kontraŭ la nazioj. La armita ribelo dauris kelkajn semajnojn, mortis multaj je ambaŭ flankoj:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Ribelo_de_la_varsovia_geto

Post la fin-batalita ribelo la germanoj detruis kaj bruligis la tutan geton. Ringelblum kune kun sia edzino kaj filo, kiun kaŝis polu sub sia forcejo, kaj ankaŭ ĉi-tiu polo estis mortpafitaj - iu prifaifis la kaŝejon. Rachel Auerbach sufiĉe frue estis *geschmuggelt* kaj travivis. Dank' al ŝiaj scioj la kestoj povis esti trovitaj.

Sen la organizitaj manĝejoj multe pli malsatmortintus pli rapide. Rachel Auerbach estis petita de Ringelblum organizi la kuiradon; sed ne eblis vivteni ĉiujn.

Rimarko de AVE/mw: en la filmo videblas ankaŭ la Zamenhofa Strato en Muranov. Ĉiuj esperantistoj scias ke inter la mortigitaj (jam 1942) kiuj vivis en tiu geto estis la filinoj de Ludoviko L. Zamenhof, Zofia (kuracistino) kaj Lidia (instruistino en multaj landoj, tradukistino, subtenantino de la Baha'a kredo). Strato en Rio de Janeiro portas ŝian nomon - ĝis nun nur tie. Koncizaj informoj pri la sorto de liaj familianoj dum tiu tempo estas i.a. en la libro de Roman Dobrzynski, „Zamenhof en Varsovio“.

Es ist eine der bemerkenswertesten und bislang unerzählten Geschichten des Holocaust: Der junge couragierte Historiker Emanuel Ringelblum initiierte und leitete im Warschauer Ghetto ein Untergrundarchiv. Dort wurden Tagebücher und Fotos, NS-Verordnungen und jiddische Poesie gesammelt und vergraben, um der

Nachwelt ein authentisches Zeugnis zu geben vom Leben im Ghetto und den Verbrechen der NS-Besatzer. Seit 1999 ist das Ghettoarchiv Weltdokumentenerbe der UNESCO.

"Wer schreibt unsere Geschichte? Wie können wir sicherstellen, dass unsere Erlebnisse, unsere Traditionen, unser Leid durch unsere eigenen Zeugnisse und nicht nur aus der menschenverachtenden Perspektive der Nazis überliefert werden?" Getrieben von diesen Fragen und Motiven haben Emanuel Ringelblum und seine rund 60 Mitstreiter über Jahre hinweg ein Geheimarchiv betrieben und gefüllt. Zeitzeugenberichte und Kinderzeichnungen, Lebensmittelkarten und Plakate aus jüdischen Theatern, Zeugnisse des religiösen Lebens und die Benennung konkreter Verbrechen, sowohl von Deutschen als auch von Polen und Juden – das Archiv sollte ein möglichst breites und ungefiltertes Bild des dem Untergang geweihten Lebens im Ghetto widerspiegeln.

